

LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
14 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

TIAM.

Kiam la milito venis en la landon ankaŭ li devis iri, li, granda, forta viro, kiu kutimis puŝi fosilon en la teron aŭ per alia peniga laboro klopodis gajni la mizeran vivpanon por la edzino kaj la infano. Solece staris lia malalta dometo, kvazaŭ iom malleviĝinte en la teron, en tiu ĉi nefruktodona, malriĉa regiono. Sed loĝis en ĝi la paco — kaj ankaŭ radio da feliĉo... ĝis...

Si postrestis kun la infano, kiu estis juna kaj nekonscia pri ĉio. Ŝi venigis la maljunan avinon kaj kune ili vivis sen li. Ili vivis kun la kelkaj dombestoj, kiujn ili posedis kaj ili atendis signon pri li... ili atendadis... ĉar baldaŭ la milito estus finita.

Sed daŭris la milito.

La knabeto kreskis, li ne konis sian patron. Post unu jaro la patro foje revenis, sed tuj la infano forgesis lin, kiam li estis ree for. La patro venis duan fojon — kaj la infano jam kuris, li eĉ povis paroli. Tiam li sciis, ke la patro estas soldato, kiu batalas kontraŭ la milito. Milito... tio estis io forta, io nigra, ĉar...

Leteroj, kiujn la patrino ricevis malofte, ankaŭ ili estis la milito, leteroj, super kiuj ŝi ploris kaj kiujn ŝi zorge metis en la ŝrankon. Ankaŭ la avino ploris pro ili. La infano nur rigardis. Li ne komprenis, diris la granduloj. La patro batalis kontraŭ la milito, sed ĉu la patro revenos iam? La milito restis ja longe.

Dum multaj tagoj, semajnoj, ili aŭdis la malproksiman tondradon, tiu tondrado estis pafado, eĉ la infano sciis tion. Li aŭskultis ĝin kun la patrino kaj la avino. Kaj vespere... tiam estis eĉ pli silente ol dumtage. Kelkfoje la dometo tremis, skuiĝis. Kaj nokte la lito skuiĝis, diris la patrino. Si ekhavis kapdoloron pro la longedaŭra pafado, kiu ne ĉesis.

Tio estis ankaŭ la milito.

Sed fine la bruado ĉesis kaj la patrino diris al la avino : Dank' al Dio, fine ni havas trankvilon. Ke la trankvilo nur daŭru longe. Sed kredeble la milito ree komenciĝos.

Lia patro venis ankoraŭ trian fojon, tiam li povis paroli kun li, li sidis sur liaj genuoj kaj la patro diris, ke li estas granda. La patro ĉarpentis por la patrino, li riparis la dometon kaj la kokejon kaj la budeton de l' kaprino. Tiam li vere havis patron. Li sekvis lin ĉien.

Ĉifoje li rimarkis, ke la patrino kaj la avino ploras, kiam la patro foriris.

Poste li pensis pri la patro, kiu estis malproksima kaj devis batali kontraŭ la milito. Li sciis, kio estas batalo, la knaboj sur la erikejo faris tion kaj ankaŭ la bestoj. Estas malbele batali. Lia patro **devis** batali.

Venis la vintro kaj la neĝo kaj akra vento fajfis ĉirkaŭ la dometo. La patrino ŝtopis ĉiujn truojn; la avino sidis frosttremante, estis ja malvarme en la malalta kabano. La brulligno forkonsumiĝis, la malvarmo postulis multon, la malgranda forno estis eluzita, ĝi ne plu donis multe da varmo; la cindrokesto estis difektita, la cindro falis sub la forno sur la ruĝajn kahelojn, kiuj formis la tutan plankon kaj multaj el ili estis krevintaj. Milito alportas mizeron.. kaj ĉi tie oni estis jam tre malriĉa.

Dum la severaj vintrotagoj ne estas facile eniri la arbaron kaj kolekti sekajn, velkintajn branĉojn, la neĝo malhelpas la puŝĉaron kaj estas malfacile porti ŝarĝon sur la dorso. La patrino irus, kiam estus eble al ŝi. La patro jam longe ne povis prizorgi brullignon.

La vento faligis la budeton de la kaprino kaj ili prenis la kaprinon en la domon, ankaŭ la kokinojn, ĉar la vento blovis tra la dormejo de la kokinoj kaj enpelis la neĝon, la bestoj povus malsaniĝi. Do la kokinoj estas en la domo, sen la bestoj ili ne povus ekzisti. La patro devas reveni por rekonstrui ĉiujn ejojn. Sed li ne revenas. La kokinoj sidas sub la kuirforno, ili sidas en la seka cindro, kiu amasiĝis tie dum multaj tagoj, cindro estas varma, tio plaĉas al la kokinoj. La kaprino staras en angulo sur iom da pajlo kaj eriko. Tiel ili kune estas kaj vivas. La infano povas nur sidi antaŭ la forno sur benketo, kaj ĉar petrolo por la lampo mankas, ili longe sidas en la vespero sen lumo kaj la infano rigardas la fajrerojn, kiuj senbrue falas en la cindrokeston sub la forno. Ili estas la sola lumo en la malhelo.

Iam venis en tia vespero du viroj — viroj sur ĉevaloj, unu restis

ekstere, la alia envenis, li ĉirkaŭrigardis kaj demandis, ĉu estas neniu. En la seĝo estis la avino, la patrino, kaj la infano antaŭ la forno, — estis mallume ĉe ili, la patrino devis lumigi. Si faris lumon, kiun ŝi konservis por la tempo kiam la patro revenos. Sed la viro deziris lumon. Ekstere huffrapis la ĉevaloj. La viro petis pri kafo. Sed kafo? Kiel ili ĝin havus? Kafo? La patrino konservis iom en kaŝita loko, sed ne donis ĝin. La granda viro kun la longa mantelo kaj botoj kun spronoj rigardis ĉirkaŭ si, li vidis la plankon el krevintaj kaheloj, la kokinojn sub la forno en la cindro, la kaprinon, kiu alturnis la vizaĝon. Estis nenio trovebla ĉi tie. Kaj li foriris kaj kunprenis sian kamaradon kun la ĉevaloj. La patrino kaj la avino interrigardis kaj ĝemis. La patrino estingis la lumon, alie ili ne havos ĝin por la patro.

Ankaŭ tio estis la milito.

Kaj ĉiam la patrino diris, ke daŭras tiom longe. La knabo pli-grandigis. La militon li prezentis al si kiel grandan, bestecan, fortan viregon, tiun militon, kiu fortendis lian patron kaj preskaŭ neniam lasis lin hejmeniri. Kaj eĉ pli malbone fariĝis. La patrino ploris pli ol iam kaj la avino okaze prenis lin tremante en la brakojn. Leteroj ne plu venis por la patrino. Ŝi atendadis plorante. Kaj dum multaj tagoj la kanonoj tondris en la malproksimo. La patrino ne multe diris pri tio...

Sed okazis reale, ke la patro revenis. Li revenis por **ĉiam**. La milito ne plu povis uzi lin. La infano atendis lin kun la granduloj.

* * *

La patro revenis. La milito forprenis de li unu kruron kaj unu piedon, li venis en veturileto, donacita al li de bonaj homoj. Li ne plu estis granda soldato, sed maljuna, pala viro, kiu multe tremis. Per sia tremanta voĉo li parolis al la infano. Vespere la patrino lin helpis enlitiĝi kaj matene ellitiĝi, la tutan tagon li sidis en la veturileto, kiun li ricevis de bonaj homoj. La milito dume finiĝis.

Ofte la infano staris apud la patro kaj rigardis lin, ne estis klare al li, estis super lia kompreno, li dezirus multon demandi, diri, sed ne sciis kiel. La avino foriris, ĉar la patro estis reveninta. Sed tiu ĉi patro ne ĉarpentis, ne hakis, ne alportis brullignon el la arbaro. Kaj lia fosilo, per kiu li estis laborinta en la tero, staris ankoraŭ en la budo...

La milito pasis, ili havis ree petrolon kaj aliajn aferojn, sed la patro sidis ĉiam kaj vivis nur malforte, la milito forrabis de la infano ĝian patron, sed foje li diris

„Patro...” li diris, „kial vi iris batali kontraŭ la milito, dum vi ne povis venki lin?” — La milito estis al li kvazaŭ malbela, forta, grandega monstro-besto, kiu nur detruis, besto, kiu faris nur malbonon, neniam bonon. Kaj ĝi formanĝis la piedojn de la patro. Jen la demando : kial lia patro estis irinta?

„Tial, ĉar”, diris la patro, „kiam la milito venas en la landon, tiam oni devas iri, oni ne povas diri jes aŭ ne, ĉar dirante **ne**, oni estas eĉ pli malfeliĉa. Nun mi estas difektita, sed tiuokaze mi tute ne plu ekzistus...” La patro silentis, pro la tremado li ne plu povis paroli.

La infano staris en profunda medito, ankaŭ ĉi tion li ne komprenis.

„Sed patro... ĉu aliaj viroj volas batali kontraŭ la milito? Se li ja difektas ilin?”

„La plimulto ne volas...” diris la patro, „sed aliaj pelas nin tien — kaj ni devas obei, la milito estas potenca monstro... Ekzistas uloj, kiuj volas profiti per ĝi.”

„Kaj ĉu ankaŭ ili iras?” demandis la infano.

„Ne, ili mem ne iras, ili devas iri.”

Sed... la infano staris dum momento kun fermita buŝo, lia mano kuŝis sur tiu de la patro.

„La milito estas stultulo!” li diris. Kaj ĝemis.

Ankaŭ la patro ĝemis.

Kaj poste :

„Sed patro, ĉiuj viroj, kiuj ne volas batali, povus iri kune kaj kune faligi sin sur la militon kaj mortigi lin? Ĉu tio ne povos?”

„Jes,” diris la patro, „en tiu okazo ili ĉiuj devas iri kune kaj eble tiam...”

Tiu tago iam devas veni, li sciis, en la okuloj fiksa rigardo.

„Kiam mi estos granda,” promesis la knabeto fajre, „tiam mi iros kun ĉiuj aliaj por mortigi la militon!”

Liaj okuloj rigardis malproksimen.

„Estas tre bone,” kapjesis la patro al li, „vi ĉiuj iru kune!”

„Nun mi estas ankoraŭ tro malgranda, ne sufiĉe forta,” konfesis la knabo pli mallaŭte.

„Nu, poste vi iru,” diris la patro denove.

„Ni povos certe venki,” decidis la infano kaj firme li fermis la buŝon kaj rigardis ree malproksimen.

... ..

Tio okazis en 1918. Ĉu la nuna junularo venos?

(Aŭtuno 1935. P. P. Zomers-Vermeer.)

Trad. : VANE.

**Parto de la malferma parolado de D.ro Zamenhof
en la unua kongreso 1905 en Boulogne-sur-Mer.**

...Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi, kaj la vortoj, kiuj estas parolataj en nia kunveno, ne flugos telegrafe al ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo; ne kunvenis regnestroj, nek ministroj, por ŝanĝi la politikan karton de la mondo, ne brilas luksaj vestoj kaj multtego da imponantaj ordenoj en nia salono, ne bruas pafilegoj ĉirkaŭ la modesta domo en kiu ni troviĝas; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema : ĝi estas la sonoj de io granda, kio nun naskiĝas. Tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugas en la mondon, korpigiĝos kaj potenciĝos, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos...

...Nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgrandan urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio. Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu la alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia kompreniĝado kaj la nia! Tie komprenas sin reciproke nur tre malgranda parto da kunvenintoj, kiuj havis la eblon dediĉi multegon da tempo kaj multegon da mono, por lerni fremdajn lingvojn, — ĉiuj aliaj partoprenas en la kunveno nur per sia korpo, ne per sia kapo : sed en nia kunveno reciproke sin komprenas ĉiuj partoprenantoj, nin facile komprenas ĉiu, kiu nur deziras nin kompreni kaj nek malriĉeco, nek ne havado de tempo fermas al iu la orelojn por niaj paroloj...

...Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj !

Legu kelkfoje ĉi artikoleon.

ĈU MI ENIROS LA ĈAMBRON KIE TAPIŜO ESTAS ?

Unue ni plenskribas la tabulon per kalkuloj,
Tiam ni el legolibro legas. Poste
La fraŭlino ekzamenas. Se iu ripeti ne kapablas, ŝi kaptas lin

Je l' haroj supre de l' orel' kaj tiras,
Ĉar tie pleje doloras. Post tio ŝi lavas la manojn,
Kaj ni finpreĝas laŭte Patronian.

Ni en sinsekvo post ŝi iras, preter la urbdom', en korton ŝian :
Kiun ŝi pli amas, tiu grimpas for
Sur nuksoarbon kaj skuas, kaj poste kolektas;
La aliaj herbon ŝiras inter la brikaro
Antaŭ la domo, aŭ urtikojn ĉe la muro,
En la korto — Ho, kiom mi
Ŝatus, se la fraŭlino min kondukus
Nur unufoje en siajn ĉambrojn.

Kaŝe mi, tra la fenestro vidis :
Sur muro bildoj, multaj bildoj, —
Kaj la horloĝ' sub vitro ne batas, sed kantas, —
Kaj la planko mikskolora estas, planko verdas.
Verŝajne tio la tapiŝo estas.

Rapide mi demetus la opankojn,*
Kaj rapide la piedojn lavus,
Por ne malpurigi la tapiŝon.

Sed scias mi : — La fraŭlino min neniam enkondukos
En belan ĉambron kie tapiŝo estas.

El : „La tagoj de l' infaneco”, de D. TADIJANOVIC, Zagreb,
Kroatujo (Jug.). Tradukis : J. VELEBIT.

* Piedvestoj de kroataj vilaĝanoj.

Vendu „La Juna Vivo” ponumere en via grupo !

ESPERANTISTA MARŜO.


W. de Korte.



Post pa-ŝo paŝ' an-taŭ-en marŝu ni. Sen-lace, fratoj, rekte al la



celo! Ar-meon ni-an estas har - mo-ni'! En koroj fid' al vojmontran-ta



stel - lo

Post paŝo paŝ', antaŭen marŝu ni,
Standardo verda nin al venko gvidos!
Ne plu timiga estas kalumni',
Pri homoj stultaj ni elkore ridos.

Post paŝo paŝ', antaŭen marŝu ni,
Sur lipoj brave sonu nova kanto!
Al pura sent', al plena harmoni'
Popolojn gvidas sole Esperanto.

Riga (Latv.)

Ludmila JEVESEJEVA.

Ciu, kiu verbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”.

Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

Por komencantoj.

PERSA HISTORIO.

Antaŭ multaj jarcentoj vivis iu reĝo en Persio. Li ordonis kunvoki ĉiujn profesorojn kaj akademianojn de sia regno kaj diris al ili : „Mi volas koni la tutan universalan historion de la homaro. Mi petas, ke vi verku ĝin por mi.”

La historiistoj promesis plenumi la deziron de la reĝo.

Post dudek jaroj ili revenis antaŭ la reĝo kun dekdu kameloj. Ĉiu kamelo portis kvincent librojn.

La reĝo diris al ili : „Mi dankas vin pro tiu malfacila laboro, sed mi devas okupi min je ŝtataj aferoj kaj ne havas tempon por legi tiom da libroj. Faru resumon de la tuta historio.”

La historiistoj laboris ankoraŭ dudek jarojn kaj entuziasme ili alportis mil librojn.

La reĝo diris : „Ankoraŭ mallongigu vian historion. Mi estas jam maljuna homo, apud la fino de mia vivo, kaj mi volas fine koni la historion de la tuta homaro!”

Post kvin jaroj ili ree venis al la reĝo, kun unu dika, granda libro.

Tiam la sekretario diris, ke la reĝo baldaŭ mortos. Ili rapide iris al li.

Kuŝante en la lito la reĝo diris : „Mi jam mortas, sen scio pri la homa historio.”

Tiam unu historiisto diris : „Mi volas resumi la historion en tri vortoj : „Ili naskiĝis, ili suferis, ili mortis.”

Varsovio (Pol.).

Trad. I. POMERANC kaj L. CHATA.

LI PRAVIS.

La lernejspektoro turnis sin al la malgranda Karlo kaj demandis :

„Kiom da tagoj estas en jaro?”

„Sep” estis la tuja respondo.

La aliaj infanoj laŭte ridis. La inspektoro kolere kriis : „Mi demandis en jaro, ne en semajno!”

La malgranda Karlo restis tute trankvila kaj diris : „Estas sep : Dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato. Nombro mem, estas precize sep kaj pri aliaj tagoj la instruisto neniam parolis.”

LA JUNAGO DE GRANDA HOMO.

En la jaro 1818-a okazis, ke konata angla kuracisto kōndukis sian fileton al la plej bona lernejo, trovebla en tiu loko.

„Sinjoro Butler,” diris la kuracisto, „jen mi venas kun mia filo Charles. Akceptu lin en vian lernejon. Mi esperas, ke li estos bona lernanto.”

„Pri tio mi neniel dubas,” respondis la estro de la lernejo. „Filo de vi, sinjoro doktoro, povas nur famigi nian lernejon.”

Sed la instruisto Butler havis grandan elreviĝon pri sia nova lernanto. Charles ofte forrestis de la lernejo kaj kiam li ĉeestis, li elpensis multajn sensencaĵojn. Fremdajn lingvojn li tute ne volis lerni kaj neniam li sciis sian lecionon. Nur por zoologio li havis fortan intereson.

„La knabo ne estas maldiligenta”, diris la instruisto, kiam la patro venis informiĝi pri sia filo. „Sed li estas tre malatenta. Tial li estas nur mezbona lernanto.”

La patro tre koleris, kaj kiam la malgranda Charles hejmvenis, la patro akceptis lin per jena riproĉo : „Belajn aferojn mi aŭdis pri vi. Vi nur povas kapti ratojn kaj hundojn. Hontindaĵo vi estas por nia familio.”

Tiu ĉi malgranda sentaŭgulo estis Charles Darwin, la poste fama naturesploristo...

LERNEJA SERCO.

Instruisto : Tradicioj estas aferoj, kiuj transiras de patroj al filoj. Johano, klopodu nun fari frazon, en kiu estas la vorto „tradicio”.

Johano : Kiam mi hieraŭ grimpis sur arbon, ŝiriĝis al mi mia tradicio.”

Respondu al jenaj demandoj :

Kiu kondukis sian filon al lernejo? Ĉu la lernejo estis bona? Kiel nomiĝis la kuracisto? Kiel nomiĝis la fileto? Kion deziris la patro? Ĉu la lernejestro timis pri la nova lernanto? Ĉu Charles fariĝis bona lernanto? Ĉu li ŝatis lerni fremdajn lingvojn? Ĉu estis io, kio interesis lin? Ĉu la instruisto opiniis lin maldiligenta? Ĉu la patro ĝojis, kiam Charles hejmenvenis? Kion li aŭdis pri sia filo? Ĉu Charles poste estis hontindaĵo por sia familio? Kiu li estis?

Legu la rakontojn kelkfoje kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

La nombro de la partoprenontoj regule kreskas — la ĝojo de la organizantoj kreskas — sed ankaŭ kreskas la zorgoj de la respondeculoj. Ili bezonas proksimume 600 guldenojn por ke ili povu dece akcepti la gejunulojn.

Multaj jam helpis, iuj vendis kartojn, aliaj sendis monon. Precipe la lotumado en Schagen liveris grandan profiton. Le redakcio ricevis entute jam 140 guldenojn. Pri tio ĝi estas tre danka, tamen ĝi denove instigas ĉiujn fari sian eblon akiri monon por la kunveno.

Anoncis sin jam 100 eksterlandanoj !

Ni aŭde petas la partoprenontojn pagi la kotizon, ĉu tute, ĉu parte.

La holandanoj pagas en tri partoj po 2,50 guldenoj, la eksterlandanoj en du partoj po 1,75 guldenoj. La unuan patron oni sendu antaŭ la 15-a de aprilo.

DONACOJ POR LA KUNVENO :

Sp. en West-Grafdijk, f 0,70; F.ino v. d. K. en Laren, f 9,00; F. M. en Leerdam, f 0,25; P. en Wormerveer, f 0,50; N. K. en West-Grafdijk, f 0,75; „Norda Stelo“-kunveno en Schapen (20-2-'38), f 10,27; lotumado en la sama kunveno, f 46,35; F.ino de R. v. M. en Oudkarspel, f 4,14; F.ino H., Wasse-naar, f 1,00; F.ino E. en Hago, f 0,50; kolekto en festkunveno en Koedijk (26-2-'38), f 7,79; S.ino v. H. en R., f 0,50; S.ino J. en A., f 0,40; Esperanto-klubo (Kuraĝo) Stomporetoren, f 2,50.

3-a LISTO DE PARTOPRENONTOJ :

53. Erna Matuszemski (15 jara pola knabino), rue Jean Jaurès, Exaudair, Francujo (Nord).

Nederlandaj knaboj : 54. Th. Dinkla (18 j.), Zuiderweg 109, Beemster; 55. P. Uvenhoven (14 j.), Zwaardstr. 13, Haarlem.

Nederlandaj knabinoj : 56. Ri Garf (16 j.), Asterstr. 19, den Helder; 57. N. Kool (14 j.), West-Grafdijk; 58. Bep Frielink (17 j.), Rembrandtstr. 17, Alkmaar; 58. J. Jurriaans (15 j.), Zaanstr. 37, Amsterdam; 60. J. Dol (17 j.), 61. J. v. Egmond (18 j.), 62. G. Barsingerhorn (15 j.), 63. A. Barsingerhorn (18 j.), 64. J. Geerts, 65. J. Stam, ĉiuj en Koedijk (N. H.).

LASTA SCIIGO.

Jus antaŭ la apero de la revuo atingis nin ĝojiga novaĵo : La Komunum-estraro de Schoorl permesis al nia komitato aranĝi lotumadon. La gajno el tiu lotumado estas la junularkaso. Ni fidas, ke ĉiu Nederlanda leganto pretas vendi lotojn po dek cendoj. La unua premio estos bela biciklo, la dua brak-ŝeĝo. Krome multaj valoraj objektoj.

Mendu tuj libreton kun lotoj ! La nevenditajn lotojn oni rajtas resendi.

LUDOJ.

Pilkludoj :

1. La ludantoj formu grandan rondon. Unu staru en la rondo-mezo. La aliaj ĵetu grandan pilkon de unu flanko al alia, kaj la infano en la mezo penu kapti ĝin. Se la kaptanto sukcesis, la lasta ĵetinto ekstaru en la mezo.
2. Ĉiuj infanoj sidu sur la tero en granda rondo. Unu staru en la rondo-mezo. Per la pugnoj la sidantoj puŝu pilkon de unu al alia, kaj la infano en la mezo klopodu kapti ĝin.
3. **Ĉasistpilklo.** Unu estu ĉasisto, la aliaj estu kunikloj. La ĉasisto havas pilkon, per kiu li penas trafi la kuniklojn sub la koksoj. La kunikloj rajtas defendi sin per la manoj kaj forpuŝi la pilkon. Kiu estas tuŝita helpu la ĉasiston trafi la aliajn. Venos do pli kaj pli da ĉasistoj, ĝis fine ne plus restas kuniklo.

Fiŝreto. Kvar infanoj donu reciproke al si la manojn, kaj formu reton. La aliaj estu fiŝoj, kiuj libere rondiras. La reto penu kapti ilin. Se iu estas kaptita, li (ŝi) venas ĉe la reto. Kiam la reto konsistas el ok personoj, ili formu du retojn. Tiel la nombro da retoj ĉiam kreskas, kaj la nombro da fiŝoj malpliĝas.

La Fruktarbejo. La infanoj formu grandan rondon. Unu foriru. Meze en la rondon oni metu ŝuon, aŭ alian objekton : ĝi prezentas pomarbon — la rondo estas muro (ĉiuj infanoj staru unu tuj apud alia). La infano, kiu forestas, estas la bubo, kiu ŝtelas la pomojn. Unu en la rondo estu farmisto, kaj li penu kapti la bubon, kiam li foriras kun la pomoj. La bubo eniras la rondon tra du infanoj, kaj eliru tra la sama malfermo. Se la farmisto sukcesas tuŝi la bubon, li fariĝas bubo, alie la sama bubo denove estu ŝtelisto.

Jakobo, kie vi estas ? Granda fermita rondo. En la rondo-mezo 5 aŭ 6 infanoj, kun tukoj antaŭ la okuloj. Unu el la „blindaj” infanoj kaptu la aliajn „blindulojn”. De temp’ al tempo li kriu : „Jakobo, kie vi estas?” La aliaj respondu : „Tie ĉi” kaj penu forkuri. La rondo zorgu, ke ili ne eliru.

La supraj ludoj (kaj en la venontaj numeroj sekvos ankoraŭ multaj) estos ludataj dum la junularkunveno en Groet. Do oni jam pristudu ilin !

GRAVA PERDO POR „LA JUNA VIVO”.

En la lastaj du monatoj du el niaj perantoj, nome S.ro Karlsson en Svedujo kaj S.ro Matthieu en Francujo, sciĝis al ni, ke ili pro tempomanko ne plu povos plenumi sian taskon kiel perantoj. Pli ol tri jaroj ili helpis al la disvastigo de nia gazeto en sia lando kaj akurate kaj sindoneme plenumis sian taskon.

Kvankam sciante, ke ili deziras nek laŭdon, nek dankon, mi ne povas preterlasi esprimi mian profundan dankon pro ĉio, kion ili faris.

Amikoj, mi deziras al vi ĉian bonon, kaj ke vi en la estonto ankoraŭ havu multan okazon labori por nia komuna lingvo.



LA JUNA VIVO VOJAĜO

AL PRAHA KAJ TIROLO.

Programo :

- 24, 25, 26 Julio : Veturo al Praha.
- 27 Julio : Veturo tra la famkonata urbo.
- 28 Julio : Al Traünkirchen ĉe la Traünlago.
- 29 Julio : Promenado en la ĉirkaŭaĵo.
- 30 Julio : Al Oetz, piede de la monto Achterkogel (3010 metrojn).
- 31 Julio : Grimpado.
- 1 Aŭgusto : Promenado al la Stuiben-akvofalo (140 metrojn).
- 2 Aŭgusto : Al Murg, ĉe la suda flanko de la Wallenlago. La Wallenlago estas unu el la plej belaj lagoj de Svisujo. Je la norda flanko la montoj levigas preskaŭ rekte el la akvo, ĝis proksimume 1800 metroj super la nivelo de la akvo en la lago.
- 3 Aŭgusto : Remi sur la lago.
- 4 Aŭgusto : Al Gerardmer en la Vasgoj (Vogezoj).
- 5 Aŭgusto : Promenado en la belaj regionoj de la Gerardmer.
- 6 Aŭgusto : Al Spa en Ardenoj.
- 7 Aŭgusto : Hejmveturo.

Pagmaniero : La partoprenontoj pagu 10 guldenojn antaŭ 1 majo. La restaĵon oni rajtas pagi kiam ajn, se nur antaŭ 12 julio. Kiu pro iu kialo retiros sin, ricevos la pagitan sumon, escepte la garantisumon de 10 guldenoj. Se li trovas anstataŭanton, li ricevos ankaŭ ĉi lastajn guldenojn.


Oni ankaŭ povas pagi en partoj, ekzemple ĉiumonate 12 guldenojn.

Se iu deziras scii ion pri la vojaĝmaniero, li petu senpagan alsendon de „La Juna Vivo“-kajeroj, kiuj enhavas la raporton pri la antaŭa vojaĝo al Svisio kaj Parizo.

La gajnintoj en la konkurso por frupagintoj :

F.ino Kieft, Laren (Ned.), KRESTOMATIO; S.ro E. Heinäharju, Turku (Finl.), KANDID; S.ro Kenichi Hasegawa, Hokkaido (Jap.), BIND. JARK. „L. J. V.“; F.ino v. Griethuizen, Staphorst (Ned.), BIND. JARK. „L. J. V.“; S.ro G. J. Vels, Utrecht (Ned.), RUSAJ NOVELOJ; S.ro Meyer, Rotterdam (Ned.), LA AVO; S.ro A. Münnich, Budapest (Hung.), LA KONGRESAJ PAROLADOJ DE D.ro ZAMENHOF; S.ro E. Karlsson, Duvhult (Sved.), SUR LA VERDA VOJO; S.ro J. Sattmann, Wien (Aŭstr.), KOMUNA KANT-LIBRO; S.ro J. M. v. Dienst, Rotterdam (Ned.), VEREMA RAPORTO PRI LA GERMAN-MOLSA MILITO; S.ro A. v. Dijk, Leersum (Ned.), KANTARO; S.ro O. Buquoy, Assebroek (Belg.), KANTARO.

ENIGMOJ



a, a, ĉ, f, i, i, kun **b** — vestaĵo
 k, l, l, n, n, o, kun **d** — havaĵo
 o, o, o, r, r, r, kun **f** — bildo
 s, t, t, t, t, u. . . . kun **k** — malpuraĵo
 La vortoj signifas, hori- kun **l** — bileto
 zontale kaj vertikale : kun **m** — devizo
 1. vojon; 2. parton de kun **n** — skribaĵo
 la kapo; 3. virinon; 4. . . . kun **p** — vazo
 instrumenton.

Riga (Latv.)

B. REICHBERG.

T. Sv. MARTIN (Ĉeĥosl.)

D. VOJO.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 1 majo.

LA SOLVOJ EL No 7.

Amiko	domo
milo	pomo
ilo	komo
ko	romo
o	nomo

La premiojn gajnis :
 Wilmott Pedersen, Aarhus, Danujo.
 G. Blonk, Overschie, Nederlando.

RICEVITAJ ESPERANTAJOJ

JUNECA ARDO. Originala rakonto de N. Bartelmes, kiu priskribas en romana formo la vivon de du junuloj el la jaroj post la mondmilito. Serenaj bildoj alternas kun malserenaj, dum revolucia fono flagre lumigas la scenejon. 120 paĝoj, formato 13 × 19 cm., kun tutpaĝa titolbildo. Prezo 0,60 guld. Mendebila al „La Juna Vivo”.

FRATECO EN LA VIVPRAKTIKO. Aŭtoro : Henr. Roland Holst--van der Schalk. Trad. H. A. Buis el la ned. lingvo. Prezento de la socio de noble pensanta virino. 28 paĝoj, formato 11 × 15 cm. Prezo 0,10 guld. Mendebila al „La Juna Vivo”.

INTERNACIAJ FERIAJ ESPERANTO-KURSOJ en Helsingor, Danlando. Internacia kurssemajno 16-24 julio; 10-taga internacia ferio Esperantista 15-25 Aŭgusto 1938. Petu senpagan broŝuron pri la restado en la Alfternejo en Helsingor, prezoj, ktp. al : S.ro L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhøj, Danlando.

„**NIA STELO**” dumonata organo de Jugosl. Katol. Esperanto-Ligo, Jesenice-Fuzine, Jugoslavujo. Aperis la unua No de sufiĉe belaspekta kaj interesa

organo de J. K. E. kaj ni gratulu Peter Golobič, kiu en tiu malagrabla tempo kuraĝis komenci la eldonadon de la revueto, kiu estis bezona en Jugoslavujo.

ILUSTRITA POSTKARTO de la Esperanto-kurso por lernantoj de ŝtata gimnazio en Bydgoszcz (Polujo), gvidata de prof. Sygnarski. Prezo 0,10 zl. Eld. Scienca Esp. Rondo en Bydgoszcz. De post la jaro 1929 la gimnazianoj lernas ĉi tiun lingvon nedevige sur la bazo de la ministeria cirkulero kaj ili ricevas poentojn sur la lernejan ateston.

„NIAJ VIZAGJOJ”. 1-a jarkolekto 1937, riĉe ilustrita. Prezo 22 din. (0,88 guld). Mendebila al „La Juna Vivo”.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio)

10 TAGA ESPERANTO-RESTADO EN „RY”, DANLANDO, 31/7-10/8 '38. Plena pensio de 35-50 kronoj = 14-20 guld. Lastjare 160 partoprenantoj el 10 landoj. Senkosta prospekto ĉe H. Grönborg, Risskov, Danlando.

SKRIBA KURSO POR A. KAJ B. (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. **La Verda Stelo, Scheldestr. 64, Amsterdam-Z.**

AL ALKMAAR! La sekva kunveno de „La Norda Stelo” okazos la 10-an de Aprilo en Alkmaar. Petu detalajn informojn al S.ro J. Mandemaker, Asterstraat 3, Alkmaar.

KUDLAGO, LA MALGRANDA ESKIMO, de N. v. Hichtum. Ideala libreto por junaj esperantistoj. El la rakonto pri la vivado de Kudlago oni ekscias multon pri la vivmaniero kaj la lando de la eskima popolo, kaj oni klare vidas, ke ankaŭ tiu popolo amas sian, por ni mallogan, landon. Prezo 0,45 gld. Mendebila al „La Juna Vivo”.

LA „EPOKO” LIBRO-KLUBO havigas al siaj membroj bonajn librojn (p. 200-paĝajn, broŝ) po 0,60 g. La libroj aperas po unu ĉiun duan monaton. „La Juna Vivo” akceptas abonojn!

LA 18-a SAT KONGRESO okazos en Bruselo de 7-13 aŭgusto 1938. Preparu vin por partopreni nian nunjaran tutmondan manifestacion!

Adreso sekretario : L. Strainchamps, 148, Av. du Roi, Bruxelles-Forest.

KONATIĜU KUN INTERNACIAJ GAZETOJ. Por 0,40 guld. (3 resp. kup) vi ricevas 10 div. Esperanto-gazetojn!

TREZORON DE ESPERANTO-LEGAJO enhavas „La Juna Vivo”. Por nur 0,20 guld. oni ricevas 10 malnovajn numerojn! Ne prokrastu. Pliibonigu vian stilon per legado! Mendu ilin rekte al „La Juna Vivo”!

ESPERANTISTA RENKONTIĜO okazos en Luksemburgo, dimanĉon, la 26-an de Junio. Gekamaradoj el aliaj landoj, partoprenu en ĝi! Ni estos feliĉaj ricevi multajn aliĝilojn. Petu sciigojn al : Lab. Esp. Grupo, 2, rue Drouin, Nancy, Francujo.



KORESPONDADRESOJ

Ĉeĥoslovakujo : 10-14 jaraj knaboj dez. kor. k. interŝ. poŝtm. k. il. poŝt. Adr. : Masaryk-lernejo en Dolni Bousov, apud Ml. Boleslav. Resp. certa.

Ĉeĥoslovakujo : 16 jara studento dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn kun geesperantistoj tutmondaj. Resp. certa. J. Stolcpart, Plzen, Houškova 23.

Danujo : Du fraŭloj (23-26 j.), dez. kor. (poŝtk. aŭ let.) kun geamikoj en ĉiuj landoj. Resp. certa. Peder Nielsen, „Risholm”, Hvam.

Danujo : 20 jara viro dez. korespondi, precipe kun Hungarujo, Svislando, Aŭstralio, Usono. Wilmot Pedersen, Ystadgade 3, Aarhus.

Jugoslavujo : S.ro Silar Generoz, Jeranovo 5, p. Kamnik, interŝanĝas poŝtmarkojn laŭ Michelkatalogo. Respondo certa.

Jugoslavujo : S.ro Štefula Drago, Šutna, Kamnik, Jugoslavujo, interŝanĝas poŝtm. kun la tuta mondo. Afranku filatele.

Jugoslavujo : S.ro Bremšak Franc, Šutna, Kamnik, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondo garantiata.

Maroko : S.ino Irène Fink, Casablanca, 41 Bd. Moulay Joussef, dez. interŝ. poŝtm. jubileajn, aerajn, bonfarajn, kaj memorajn kun ĉiulandanoj, pm. nedifektitajn. Afranku per novaĵoj. Anonco ĉiam validas.

Nederlando : Ger. Franssen Jr., 23 jara, dez. kor. en la angla k. esp. lingvoj kun ĉiu lando. Nur longedaŭra kor., nur per leteroj. San. „Zonnestraal”, Loosdrechtse Box, Hilversum.

Nederlando : Esp. grupo (komencantoj) dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Adreso : F.ino D. H. v. Dieren, Winkel (N.-H.).

Nederlando : S.ro M. Breeel, dez. interŝanĝi germanajn poŝtm. kontraŭ nederlandaj. K. ĉ. l. dez. kor. Koudekerkscheweg, B 282, Koudekerke (Z.).

Nederlando : S.ro S. J. v. d. Heide, Zaanstr. 8, Utrecht, dez. interŝ. postm. k. korespondi kun Ned. Hindujo, Ameriko, Ruslando.

Nederlando : S.ro C. Salemink, studento, Juliana Box, Laren (N. H.), dez. kor. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn. Respondo certa.

Polujo : Kahlau Franciscek, Bydgoszcz, Sienkiewicza 14, dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Svedujo : Letervesperon aranĝos Esperanta klubo de S. K. F. (Sv. globla-gra fabriko) la 25-an de aprilo. Sendu multnombre let. kaj poŝtk. laŭ jena adreso : S. K. F. Esperantoklub, Stallmästaregarden, Göteborg.

Svedujo : 21-jara junulo dez. kor. kun geamikoj en la tuta mondo. Respondo certa. Yngve Nygren, Box 1835, Holmsund.

Nederlando : Esp. grupo dez. kor. kun gesamideanoj (16-50 jaraj) en ĉiuj landoj. Adr. : F.ino A. Swart, Beets (N. H.).

Danujo : Kiuj gesamideanoj dez. kor. pri eventuala vizito al dana banloko, aŭ gastigo de kelkaj danoj. B. Sørensen, laktkontrolisto, FASTER, Skern.

U. S. S. R. : Efim Strebelev, Moskvo, 75, Bolšaja Marfinskaja 7, dez. kor. per il. poŝtk. kun geknaboj. Interŝ. poŝtm. kaj ŝakludas.

Anglujo : 3 amikinoj (19, 25, 39) dez. kor. kun la tuta mondo. Adr. : Mildred Church, 48, British Rd, Bedminster, Bristol 3.

Francujo : Douai (Nord). La Esp. Union Locale, sindikata domo, 49 rue Cuvelle. 30 gelaboristoj kaj oficistoj (18-50 j.), dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Respondos ĝis la 15-a de majo 1938.

Nederlando : 18-jara oficisto dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo. P. Beerens, Oude Voetboogstr. 8, 's Hertogenbosch.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe „La Juna Vivo”.

Verda Revuo , monata jara f 1,50	Esperanto-Internacia , mon. jara f 2,50
Nia Gazeto , monata » f 0,90	Bulteno de I. S. A. E. , dumo-
Scienca Gazeto , dumonota » f 1,50	nata » f 1,35
Heroldo de Esp. , semajna... » f 6,80	La Praktiko , monata » f 2,50
Niaj Vizagoj , monata » f 1,00	

Specimenoj : Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimenojn de aliaj gazetoj ni sendas (se en stoko) kontraŭ 5-cenda poŝtmarko.

La red. de „La Juna Vivo” neniel respondecas pri neregula apero de la supraj gazetoj !

HEROLDO DE ESPERANTO

La semajna organo de la
Esperanto-movado

„Mia plej regula kaj plej ŝatata „gasto...” — „Mia fidela amiko, kiun mi ne volus malhavi...” — „La ĉefa fonto, el kiu mi ĉerpas ĉiam novan entuziasmon kaj fervoron por nia movado...” — „Mian saluton al Heroldo, kiu estas ĉiusemajna sunradio en malpaca kaj malbona epoko...”

TIEL SKRIBAS AL NI NIAJ
LEGANTOJ KAJ AMIKOJ !

HEROLDO DE ESPERANTO

Scheveningen (Nederlando)

**X-a NEDERLANDA
ESPERANTA-KONGRESO**

Je Pasko 1938 (16, 17, 18 Aprilo)
en Amsterdam

La unua Nederlanda Esperanto-Unuiĝo „La Estonto Estas Nia” (fondita 1905) invitas ĉiujn Esperantistojn kaj interesigantojn al partopreno en sia jubilea kongreso. Petu aliĝilojn kaj informojn ĉe la sekretariino, F.ino E. Keller, Fred. Hendrikplantsoen 104, Amsterdam-W.

**UNUIĜO POR
FREMDULTRAFIKO**

**La venonta internacia
junularkunveno**

SENPAGAJN INFORMOJN

PRI RESTADO KTP.

ONI PETU AL :

V. V. V. „GROET-KAMPERDUIN”

Post Groet (N. H.)

TEL. 423

Subtenu la Internacian Junularlaboron !

Presejo A. Hessens, Bruselo.